

Tio estas Esperantujo: diverseco kaj efika komunikado samtempe

La 16-19an de novembro en la universitata centro pri servoj (CUDS) de la Benemérita Universidad Autónoma de Puebla (BUAP) okazis la 14a Meksika Esperanto Kongreso (MEK), en kiu partoprenis iom pli ol 100 homoj el diversaj partoj de la lando kaj eksterlandaj esperantoparolantoj el Belgio, Kanado, Konga DR, Koreio, Hispanio, Pollando, Ruslando kaj Usono.



La kongreso neoficiale komenciĝis vendrede, la 16an, per interkona vespero, ĉirkaŭ trideko da homoj renkontiĝis en restoracio por kune manĝi, trinki kaj babili.

La temo de la 14a MEK estis “Interkultura komunikado kaj internacia perado”, ĝi ebligis diskuti, preparoli kaj interŝanĝi ideojn, sentojn kaj spertojn rilate al uzo de Esperanto kiel ilo por disbati kaj trapasi la barilojn ekzistantajn en la mondo. Ekzemplo de tio estis la dek ses prelegoj prezentitaj sabate kaj dimanĉe. Ses el ili estis virtualaj prelegoj gviditaj de homoj loĝantaj en aliaj landoj.

Sabate matene post la inaŭguro fare de la prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio (MEF) Mallely Martínez Mateos kaj de LKKano Iván Deance, komenciĝis la programo, en kiu estis kelkaj prelegoj pri temoj malsamaj, sed ligitaj al la kongresa temo.

La sciencaj prelegoj komenciĝis de Iván Deance kaj Verónica Vázquez, profesoroj en BUAP kiuj parolis pri Esperanto kiel alternativo por hispanparolantoj kadre de interkultura komunikado. Sekvis prelego de Ilona Koutny, profesoro ĉe Universitato Adam Mickiewicz, pri la lingvaj aspektoj de interkultura komunikado. Vespere Juan Jacobo Schmitter, esploristo de meksika institucio ECOSUR, prelegis pri iĥtiologio kaj la graveco de terminologio en scienco, kaj Orlando Raola, profesoro pri kemio en Santa Rosa Junior College kaj eksprezidanto de Esperanto-USA, prelegis pri perspektivoj pri la ĉefaj nuntempaj problemoj en la kemiaj fakoj.

Dum la sama tago ankaŭ okazis movadaj prelegoj; la unuan prezentis matene d-ro Raola, li parolis pri UEA kiel daŭra tegmento de niaj agadoj kaj pri la diversaj skismoj de la asocio tra ĝia historio. Poste David López gvidis demandojn kaj respondojn pri kialoj kaj manieroj iĝi gastiganto de Duolingo kaj Joaquín Rosillo prezentis posttagmeze prelegon pri siaj spertoj kaj konsiloj rilate al unuafoja partopreno de Universala Kongreso.

Dimanĉe matene en la salono Sekelj Dmitrij Ŝevĉenko ekis la diskuton inter la ĉeestantoj pri la stato, problemoj kaj perspektivoj de Esperanto en sociaj retoj, kiu estis sekvita de prelego, kiu prezentis la rezultojn de esploro farita de d-ro Luis Córdova pri integriĝo de Latinameriko kaj Karibo. En la salono Silbernik oni priparolis matematikajn konceptojn uzitajn en la kreado de mapoj de la cerba kortekso

fare de la scienco esploristo Michael Porter. Profesoro Kristin Tytgat parolis pri la aldona valoro de Esperanto en la kunteksto de interkultura lernado kaj Anna Striganova rakontis pri instruado de Esperanto en Rusia universitato de amikeco inter popoloj.

Carlos Hernández parolis pri socia servo rilate al vigligo de la Esperanta bildo. Posttagmeze Normand Fleury, prezidanto de la LKK de la 105a Universala Kongreso de Esperanto, invitis la kongresanojn partopreni ĝin kaj viziti la kongresurbon Montrealo en 2020. Laste Juan Jacobo Schmitter, eksprezidanto de MEF, rakontis pri sia sperto dum la traduklaboro de *Tra l' okuloj de l' venkitoj* de Miguel León-Portilla.

Dum la kongreso estis instruaj programeroj, kiuj funkciis ne nur kiel platformo por praktiki la lingvon kaj konatiĝi kun homoj kaj iliaj kulturoj, sed ankaŭ kiel ŝanco por lerni ankoraŭ pli pri nia lingvo. Víctor Sombra gvidis la programeron “Mi scivol emas pri via kulturo”. Sesion de tabloludoj por interagi kaj lerni Esperanton gvidis Víctor Sombra kaj Ana Velasco. Samtempe okazis ankaŭ programero dediĉita al pretiĝo por la KER-ekzamenoj, gvidita de Mallely Martínez en salono Lanti, kaj alia programero pri la uzo kaj amikiĝo kun la akuzativo fare de Carlos Hernández en la salono Azorín.

Ĉirkaŭ tridek homoj registriĝis por la elementa kurso, kiu daŭris du tagojn sub la gvido de Gabriel Jiménez kaj David López. Kvankam ne ĉiuj lernantoj povis resti dum la tuta kongreso, ili havis la ŝancon sperti multkulturan etoson danke al la ĉeesto de lernantoj el diversaj partoj de Meksiko kaj eĉ el Suda Koreio kaj Usono.

Konversacia ateliero por komencintoj estis gvidata de s-ro Kim, koreo loĝanta en Usono. Tre interese estis por la partoprenantoj praktiki la lingvon kun sperta parolanto kaj aktivulo en Esperantujo, ili do opiniis “Tio estas Esperantujo: diverseco kaj efika komunikado samtempe”.

Rosa Azorín rakontis pri la vivo de sia avo, hispandevena esperantisto Francisco Azorín Izquierdo, kiu kontribuis al la Meksika movado.

Ŝajnas, ke lingvemuloj bone naĝas en akvoj de Esperantujo, aŭ eble Esperantujo estas konstruita de homoj kiuj ŝatas lingvojn kaj kulturojn. La 14a MEK ofertis al ili taŭgan lokon por paroli en aliaj plej ŝatataj lingvoj: kajmanejo, zorgita kaj gvidita de Carlos López. La franca, la itala kaj la sveda estis inter tiuj lingvoj, kiujn oni havis la ŝancon praktiki kaj aprezi.

Puebla estas urbo, kie oni povas facile percepti la influon de eŭropeca arkitekturo, ĉefe franca, en la urbocentro. Tie, dum la tri kongresaj vespernoktoj grupoj de partoprenantoj promenis kaj profitis la okazon por konatiĝi kun ili mem kaj kun la lokuloj kaj aliaj vizitantoj, ekzemple dum dancado de “huapango huasteco” aŭ dum babilado en bonetosaj drinkejoj de avenuo Juárez. Oni ĉiam bezonas tiujn spacojn en Esperantujo ekster prelegĉambroj kaj la kongresejo por fortigi rilatojn inter ni, esperantistoj. Tiujn spacojn kie ne gravas aĝo nek deveno, kiam oni havas komunan ilon por kundividi homo kun homo, tiujn spacojn oni trovis tie.

Dum la kongreso estis ankaŭ grava okazo por ekzameniĝi kaj tiel validigi la lingvokononjojn. Dimanĉe matene en salono Lanti komenciĝis la sesio por KER-ekzamenoj, 13 homoj pretiĝis por la sesio kiu daŭris proksimume kvar horojn.

Dume alia utila programero okazis dimanĉe posttagmeze: parkerigo de kaj ekzameniĝo pri la himno *La espero*, kiel grava parto de la literaturo en Esperanto kaj identigilo de nia kulturo, gvidita de Guadalupe Vega Acosta kaj Joaquín Rosillo.

La Meksika Esperanto-Junularo dimanĉe kunvokis junulojn por MEJ-kunveno, kie ili parolis pri aferoj rilate al renovigo kaj vigligo de la sekcio. Feliĉe estis videbla reago de la junaj ĉeestantoj, kaj oni povis interkonsenti pri gravaj aferoj, kiel la ŝanĝo de la aĝlimo kaj kunlaboro kun MEF en sociaj retoj por uzi kaj diskonigi Esperanton.

La Arta Vespero estis plena je muziko en Esperanto kaj en aliaj lingvoj danke al la partopreno de Zhou Mack Mafuila, afrika regemuzikisto, de la grupo *Nomadoj de la Huasteca* kaj de grupo de muzikistoj de la fakulo pri artoj de la universitato de Puebla kiuj kortuŝis, amuzis kaj dancigis la ĉeestantojn.

La lastan tagon ni kune ekskursis al Cholula, vilaĝo, kie troviĝas preĝejo kuŝanta sur monteto kiu fakte estas piramido. Tie oni ĝuis manĝojn, ridon kaj brakumojn kun amikoj kiujn ni devus baldaŭ ĝisi kaj esperi vidi denove iam en Esperantujo.

David López Rueda



Tio estas Esperantujo: post la arta vespero en MEK-14